



PILO-PRESS

Internacia
Informservo

La Juna Amiko

Aperis n-ro 2

Prezo 1,- DM

=====

Eldonanto/Herausgeber

Ludwig Pöckel
Postfach 2113
D-85 Nürnberg 1
Tel. (09 11) 46 36 49; 51 42 69

Nr-o 12/1974 29 marto 1974
Aperas ĉiusemajne

Eŭropa Esperanto Centro respondas

En n-ro 11/1974 de Pilo-Press ni publikigis leteron de la Eŭropa Parlamento - Komisiono por junularo kaj kulturo - Strasburgo de la 14.2.1974.

Hodiaŭ ni nun publikigas la respondon de la Eŭropa Esperanto Centro (E.E.C.):

20-2-1974-a

Al sinjoro J. B. Broeksz
Komisiono por junularo kaj kulturo
Eŭropa Parlamento - Strasburgo

Tre estimata sinjoro Broeksz,

La enhavo de via letero de la 14-2-1974-a (GO/AT/ek 0171260) tre ĝojigis min pro via rekono de la valoro de Esperanto kaj pro via malĝojo pri la fakto ke la uzado de tiu lingvo restis limigita. Tio estas klarigebla el la fakto ke Esperanto estas nedeviga instru-fako en la lernejoj kiel la aliaj modernaj lingvoj.

Kun vi mi samopinias ke la lingvoproblemo en Eŭropo estas komplika kaj delikata.

Intertempe la Eŭropaj Komunumoj publikigis raporton titolitan "Komunuma instru-regado". En ĉi tiu la lingvo-problemo estas detale traktita kiel sekvo de esploro farita de prof. o Henri Janne inter 35 aŭtoritatuloj. Oni atendus ke en tiu raporto tiom konata lingvo kiel Esperanto, kiel solvo por la lingvoproblemo en Eŭropo, estus ekzamenita por ekkoni ĝiajn meritojn, des pli ĉar tiu lingvo 1-e evitas ĉiujn delikatajn facetojn de la problemo, 2-e ĝi estas ekstreme taŭga por la amasoj de la Eŭropaj popoloj kaj 3-e donas perspektivon al efika komunikado. Tamen Esperanto ne estas nomita eĉ unu fojon!

En Memorando (11-2-'74) direktita al la Ĝenerala Direktoro por Esploro, Scienco kaj Instruado mi detale montris al tiu ellaso. Per aparta letero al prof. o Janne (18-2-'74) mi sendis kopiojn de la prelego de prof. o H. Brugmans, eksrektoro de la Eŭropa Kolegio en Bruĝo, en kiu li esprimas la esperon ke "Esperanto estu deviga instrufako en la landoj de la Eŭropa Komunumo kaj ekster tiuj."

En nia tempo kiam la lingvoproblemo en Eŭropo kondukas al multa malkonveno, malrapidiĝo, altaj kostoj kaj maltrafitaj ŝancoj, la peto pri esplorado de la problemo signifas nenecesan prokraston de la solvo. Ĉar ĉiom da jam disponebla sperto pri naciaj lingvoj kaj pri Esperanto pli ol sufiĉas por preni jam nun decidon. Prof. o Janne neglektis tiun sperton kaj tiel detenis, al sia raporto realan perspektivon por estonta Eŭropa instruado kiu estus povinta solvi la lingvoproblemon en Eŭropo.

Ĉiu kiu serioze volas trarigardi dum 20 minutoj la Esperanto-gramatikon povas konvinki sin ke rigore simpligitaj lingvoreguloj neniel difektas (tamen faciligas) la transdonon de informo kaj ke la sistemo de normigitaj afiksoj al ĉiu uzanto ebligas plivastigi sian parke-ran vorttrezoron senlime kaj celtrafe.

Eŭropa Esperanto Centro respondas (daŭrigo)

Krome estas prenebla tiom da sperto pri Esperanto (en Esperanto-bibliotekoj, Esperanto-kongresoj, pri Esperanto-renkontiĝoj, ĉe Esperanto-instruistoj ktp) ke oni nur bezonas etendi la manon por ek-havi la informojn. Tamen oni bezonas voli etendi la manon, sed bedaŭrinde tiu volo mankas ĉe la plimulto de la eksteruloj. Tiuj preferas studadi kaj esploradi por povi prokrasti la malfacilan decidon. Tio eble ŝajnas al vi troiga aserto, sed domaĝe, tio estas seniluziiga fakto.

La decido restas malfacila ĉar la problemo estas nesolvebla tiom longe kiam oni eksterlasas Esperanton. La decida solvo nur estas ebla kiam oni malfiksas la internacian komunikadon (kiu unuavice devas esti efika kaj neŭtrala) disde la bezono pri kulturaplikado per historiaj lingvoj kiuj estas malfacilaj kaj submetitaj al persona prefero. De tiu vidpunkto oni povas igi Esperanton, kiel demokratitan, nediskriminadan kaj efikan helpilingvon, unua fremda lingvo deviga en la lernejoj (garantiante tiel la internacian komunikadon). Krom tio oni povas enigi en la lernoprogramojn ĉiujn lingvojn de Eŭropo kiel preferobjektojn por plenumi la bezonojn pri scio de naciaj kulturoj kaj la kapablecojn de la lernantoj. Tio ne signifas ke kultura interŝanĝado pere de Esperanto ne estas ebla, kontraŭe, estos pli facile per ĝi kontakti kun la kutimoj kaj opinioj de la homoj de ĉiuj popoloj (kondiĉe ke ankaŭ ili lernis Esperanton en la lernejoj).

Ĉi tiu rigardo al la problemo pravigas ĝian solveblon, ne paŝante en delikatajn kaptilojn, kiuj kaŭzas perdon de prestiĝo.

Estas ĉi tiu kompreno kiu estas bezonata, iu profunda esplorado certe ne.

Volonte mi disponigas mian 48-jaran sperton pri Esperanto al vi kaj al tiuj kiuj iam devos decidi en tiu koncerno aŭ kiuj nun bonvolas fari iniciaton.

Kun plej alta estimo,

ss. D-ro G.F. Makkink

Novajoj pri la 59a UK

Aperis nun la Dua Oficiala Bulteno kun ĉiuj gravaj sciindaĵoj por la kongresano, ekz. pri loĝado, ekskursoj, bankedo, pri la provizora programo. Bonvena por la partoprenonto certe estas la malgranda mapo pri Hamburgo por jama orientiĝo.

Ĝis la 27a de marto 1974 aliĝis 1 055 kongresanoj el 43 landoj.

Gratulon al Radio Varsovio

La 4an de aprilo 1974 estas la 15a datreveno de la Esperanto-elsendoj el Varsovio. Antaŭ 15 jaroj, la 4 an de aprilo 1959, aliĝis unuafoje la Esperanto-voĉo de la naskiĝurbo de Esperanto. Inter la unuaj Esperanto-parolintoj estis Jerzy Ŭspieŝki kaj Ada Sikorska, la nuna redaktorino de Heroldo de Esperanto. La unua intervjuito estis Carlo Figliera, tiama Konstanta Kongresa Sekretario de la Universala Esperanto-Kongreso, kiu en 1959 okazis en la pola ĉefurbo.

Pilo-Press jam ofte reportis pri la unuopaj elsendoj el Varsovio kaj flegas bonan kontakton kun la Esperanto-redakcio, kio montriĝas en la rubriko "Novajoj de Pilo-Press" en la kadro de la Esperanto-Ekspreso. Pilo-Press kore gratulas al Varsovio!

Esperanto-teamo de Munkeno ankoraŭ aktivas

Bonn (pp) Kvankam UEA ne povas oficiale surkampigi teamon por la Mondĉampionado pri Futbalo aŭ por la Olimpiaj Ludoj en Montrealo, tamen la teamo de Munkeno ankoraŭ aktivas. Antaŭ kelkaj tagoj la organizanto de la Munkenaj Ludoj, s-ro Willi Daume, vizitis la aŭstralian Ambasadoron en Bonn por diskuti preleg-vojaĝon al Kanbero. S-ro Harry rememorigis, ke en 1972 li verkis broŝuron "Saluton Amiko", kaj donacis ekzempleron al s-ro Daume.

Ambasadoro Ralph Harry transsendas al la Kanada Esperanto-Asociosian raporton, dokumentaron kaj rekomendojn por agado antaŭ kaj dum la Olimpiaj Ludoj de 1976.

S-ro Harry ankaŭ sendas al la aŭstralia teamo kiu partoprenos la Mondĉampionadon pri Futbalo, kaj al la skota teamo ekzemplerojn de "Saluton Amiko", "Mi estas Pelé" kaj "La Sporta Lingvo", kaj rekomendas al Aŭstralia Esperanto-Asocio kaj al la Brita Esperanto-Asocio, ke ili sendu al ĉiu ludonto ekzempleron de "Libereco de Parolo" kaj lernolibron en la angla lingvo. Li esperas, ke la Germana Esperanto-Asocio faros same por la teamoj de la FRG kaj GDR.

Beatles-Spekulacio kreskas

Londono. La Brita Esperanto-Asocio informas: Kvin gigantaj pop-koncertoj fare de Beatles venontan julion en Montrealo povus heroldi novan epokon por Esperanto kaj Olimpiaj Ludoj, laŭ raporto de la Pariza semajngazeto "Express".

Paul, George, John kaj Ringo formas novan grupon, kaj okazigos koncertojn "por ke elspezoj estu donitaj al ĉiuj atletoj kiuj partoprenos Olimpiajn Ludojn en 1976, kaj ke Esperanto estu enkondukita en ĉiujn inform-kaj komunik-sistemojn de tiuj ludoj," sciigas la raporto.

Kvankam la koncertoj estos senpagaj, mondaj rajtoj por filmoj, televido, diskoj kaj kasetoj alportos ĉirkaŭ 10 milionojn da dolaroj. Ĉiu atleto ricevos 1 000 dolarojn kaj 2 000 dolarojn se li konsentos lerni Esperanton.

La Brita pop-gazeto "Melody Maker" raportis, ke George Harrison vojaĝos en Usono pli poste ĉi-jare, kaj ke Paul McCartney reformos "Wings" kiel funkciantan orkestron. La Harrison-vizito estos lia unua publika apero ekde la koncerto Bangla Deŝo malfrue en 1971. Raportoj el Usono sugestas, ke la vojaĝo inkluzivos Ringo Starr, Eric Clapton kaj Leon Russell - tri el la artistoj kiuj aperis en la mamota koncerto Bangla Deŝo en Madison Square, Novjorko. Ili ankaŭ indikas, ke Harrison kaj Starr aliris pop-organizanton Bill Graham, por ke li organizu koncertserion laŭ la maniero de la spektakloj Bangla Deŝo.

La nova orkestro funkcias kiel unuo, kaj eventualaj datoj estas planitaj por pli poste ĉi-jare. Proparolanto de McCartney tamen sciigis al "Melody Maker": Ni memevidente ne povas nunmomente daŭrigi per konkretaj vizit-detaloj ĝis kiam la nova orkestro estos formita kaj ekzerciginta."

George Harrison, laŭ London Evening Standard, diris: "Neniaj decidoj estas faritaj rilate al la vojaĝo, al organizanto, nek pri amoj de la orkestro mem." Ĉio estas spekulacio, li aldonis.

Esperanto-aranĝoj

3a Esperantista Semajnfino de SEL

Sarlanda Esperanto-Ligo okazigos sian 3an Esperantistan Semajnfiron en la naturamika domo Kinkel je la 27 kaj 28 aprilo 1974. La programo antaŭvidas kursojn kaj prelegojn por komencantoj, progresintoj kaj Esperanto-parolantoj. Krome oni antaŭvidas liber-tanplan programon. Por infanoj estas sufiĉe da ludebleco ĉirkaŭ la naturamika domo. Aliĝkotizo estas 5 GM.

Informojn donas kaj aliĝojn akceptas ĝis la 15.4.74 Reinhard Hauptenthal, 6602 Dudweiler, Franz-Schubert-Str. 26

Kultura kunveno en Kolonjo

Rejn-Vestfalia Esperanto-Ligo (REVELO) organizas kulturenan kunvenon sabate, la 6 aprilo 1974, je la 14,30 h, en Köln restoracio "Kölsche Boor", Am Eigelsteintor. Prelegos la konata belga esperantisto Jo Haazen pri "Nuntempa muziko en la flandra lingvoteritorio". Krome oni traktos diversajn temojn, i.a. la baldaŭ komenciĝonta oficiala eksperimenta Esperanto-instruado en lernejoj.

Esperanto-aperajoj

Lazaro Ludoviko Zamenhof: Letero al Emile Javal, kun komentario de Gaston Waringhien kaj Bibliografio de Reinhard Hauptenthal. Fotoeldono de A.E. Iltis, Saarbrücken 1973, DIN A 5, 28 paĝoj, prezo 4,- DM

Temas pri fotoeldono de manskribita letero de d-ro Zamenhof al Emile Javal pri du tiamaj problemoj: reformo de Esperanto kaj Hilelismo. Ambaŭ projektoj ne realigis, tamen estas interese legi la ideojn kaj pensojn de Zamenhof. Por bona scianto de Esperanto la manskribaĵo ne donas gravajn malfacilaĵojn.

Internacia komerca-ekonomika vortaro en 9 lingvoj

(Esperanto, angla, germana, hispana, franca, itala, nederlanda, portugala, sveda)

Nun estas fine sur la merkato la nova kaj longe atendata faka vortaro, frukto de pli ol naŭjara internacia kunlaborado. Ĝin projektis, kompilis kaj redaktis F. Munniksmä, Nederlando, sub aŭspicio de Instituto por Esperanto en Komercio kaj Industrio (EKI)

Formato 15 x 21,5 cm, 535 paĝoj, bindita, prezo 72,50 DM/GM
por membroj de Esperanto-asocioj 65,- DM/GM

Eldonis Kluwer, Nederlando, distribuas en Germanio Verlag Kommentator GmbH, 6 Frankfurt/M.

Mendebla ĉe Ludwig Pickel, 85 Nürnberg 1, Postfach 2113

La vortaro kreigis tute pere de la Internacia Lingvo. Ekzemple la difinoj kompiliĝis en Esperanto kaj poste tradukiĝis en la anglan ktp. Ĝi enhavas specifan terminologion de organizado kaj tekniko de la komercio, ekonomiko kaj sociala ekonomiko.

Enpropra afero: Ni petas pardonon pro la malfruigo de tiu numero, kaŭzita de gripo-malsaniĝo de la redaktoro.